XIde Jaargang No. 2 21 Maart 1946

# NEDERLANDA ESPERANTISTO

Orgaan v. d. Ned. Esperantisten-Vereniging „La Estonto Estas Nia"

— Onder redactie van het Hoofdbestuur —

Adres redactie en adm.: Mr. A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid.

## ASOCIA JARRAPORTO 1945

Senrevene jam pasis la jaro 1945-a kaj kun ĝi la mondmilito, kiu grave suferigis, eĉ preskaŭ mortigis, nian asocion. Tamen la anoj, kiuj kelkloke ankoraŭ interkontaktadis tiom longe, kiom la cirkonstancoj ebligis tion, ne malesperis kaj tuj post la liberigo de nia lando oni diversloke eklaboris por rekonstrui nian organizon. Konsiderante la amplekson taskon farotan kaj la malfacilajn cirkonstancojn, kiuj precipe en la unuaj monatoj post la liberigo treege malfavore influis la rekonstruan laboron, ni ne povas esti malkontentaj pri la rezultatoj, atingitaj en la jaro 1945-a. Kvankam fine de 1945 nia asocio laŭ membronombro ankoraŭ ne atingis la antaŭmilitan staton, diversaj faktoj atestas pri kresko de interesiĝo pri Esperanto ĝenerale kaj tiel en- kiel eksterlande nia movado jam notis atentindajn sukcesojn, kiuj supozigas baldaŭan ekprosperon, ankaŭ de nia asocio.

*Ĉefestraro:* Nelonge post la restarigo de nia asocio s-roj W. Grolleman kaj P. M. Mabesoone konigis la deziron, demeti siajn funkciojn en la ĉefestraro, kiu ĝis tiam konsistis el jenaj personoj: s-ro W. Grolleman (Lochem), prezidanto; s-ro P. M. Mabesoone (Amsterdam), sekretario; f-ino A. J. Ploeg (Amsterdam), kasistino; s-ro F. Weeke (Den Haag) vic-prezidanto; f-ino A. Laverman (Leeuwarden) 2-a sekretariino kaj s-ro R. J. Kuiper (Enschede), 2-a kasisto. Transprenis ilian laboron provizore s-roj P. W. Baas (Amsterdam) kaj Mr. A. J. Kalma (Amsterdam). Ĉar oni ne proponis aliajn kandidatojn, s-roj Baas kaj Kalma laŭ par. 49-a de la ĝen. interna regularo estis elektataj resp. prezidanto kaj sekretario. Intertempe ankaŭ f-ino A. Laverman eksiĝis kaj estis anstataŭata de s-ro J. A. v. d. Veen (Dokkum). Por kompletigi la ĉefestraron oni proponis du kandidatojn, nome s-ron H. A. Appel (Bergen op Zoom) kaj s-ron A. v. d. Vegt (Rotterdam). Referendumo, kies rezulton ni publikigis en cirkulero 8-a decidis favore al s-ro Appel.

La ĉefestraranoj regule interkontaktis per cirkuleroj: Konciza raporto pri la ĉefestrarkunveno o-

kazinta 11-an de novembro, aperis en cirkulero 6-a. La adm. estraro kunvenis triope 4 fojojn; la prezidanto kaj sekretario regule interkontaktis 2 fojojn ĉiusemajne.

*Sekcioj kaj Membronombro:* Tuj post la liberigo de nia lando nia asocio nombris nur malmultajn sekciojn, sed en la daŭro de la jaro multaj aliaj restariĝis, dum ke novaj sekcioj estis (re)fondataj en Amersfoort, Bergen- op- Zoom, Bolsward, Dokkum, Hoogezand, Winschoten, kaj 't Zand. Je la fino de 1945 nia asocio nombris 26 sekciojn. La membronombro tiam sumiĝis 740 (642 sekciaj membroj kaj 98 ĝen. membroj).

*Konsilantaro:* En ĉi tiu jaro ni sukcesis enoficigi konsilantojn en ĉiuj provincoj, escepte de N.-Holland, kie ni fakte ne bezonas apartan propagandiston, kaj Limburg, kie nia asocio havas nur kelkajn ĝeneralajn membrojn. La cirkonstancoj treege malfaciligis efikan laboron de ĉi-supre nomitaj funkciuloj, kaj pro tio nur kelkaj sendis raporton.

PROVINCOJ:

*Friesland:* En ĉi tiu provinco trafikaj malfacilaĵoj ĉi-jare malebligis efikan kursaranĝadon kaj restarigon de kelkaj likvidiĝintaj sekcietoj. Nia plej granda sekcio en Leeuwarden, kun kiu ni regule interkontaktis, kontentige laboris. Krom kurso por plenkreskuloj ĝi aranĝis kelkajn infankursojn. La kurso en Sneek ankoraŭ daŭras kaj espereble rezultigos membrokreskon de la tiea sekcio. Heerenveen, kiu ĉi-jare festis sian $12^1/_2$-jaran ekzistadon, ne aranĝis kurson. Grava perdo por nia nova vigle laboranta sekcio Dokkum estis la foriro de ĝia fervora sekretario s-ro H. Hasper. La grupeto en Bolsward, kies motoro estas nia konata samideano s-ro S. S. de Jong, ankoraŭ restis malforta.

*Groningen:* Sukcesplena kurso pligrandigis la membronombron de nia sekcio en Groningen. La sekretariino regule kaj modele raportis. Nova sekcio aliĝis en Hoogezand, dum ke nia iama sekcio en Winschoten renaskiĝis. S-ro P. Korte sukcesis regrupigi niajn gefidelulojn en Veendam.

*Drente:* En Drente ni ĝis nun ne sukcesis refondi niajn likvidiĝintajn sekciojn, sed nia tiea konsilanto s-ro H. Huisjes fervore laboras kaj sendis esperdonan raporton.

*Overijsel:* La tiea konsilanto apenaŭ donis vivosignon kaj pro tio s-ro R. J. Kuiper transprenis lian taskon. El Zwolle ni aŭdis nur malmulton. Almelo kontentige laboris kaj regule interkontaktis kun ni. Enschede ĝis nun ne sukcesis pligrandigi sian membronombron. Klopodoj fondi sekcion en Deventer, fiaskis.

*Gelderland:* Malgraŭ malhelpaj cirkonstancoj Arnhem montris laŭdindan aktivecon. La sekretariino, samtempe konsilantino regule raportis. Kvankam Culemborg sufiĉe frue anoncis sian renaskiĝon, la membroliston ni ricevis nur malfrue kaj poste la sekcio obstine silentadis.

*Utrecht:* Nia sekcio en Utrecht ne sukcesis trovi taŭgan kursejon, sed regule kunvenis kaj varbis kelkajn novajn adeptojn. Nova sekcio, ĝis nun ne tre multmembra, fondiĝis en Amersfoort. Ni regule interrilatis kun la tiea sekretariino kaj la konsilanto.

*Noord-Holland:* Ĝenerale ni povas esti kontentaj pri la aktiveco de niaj sekcioj en tiu ĉi pro-

vinco. Amsterdam, laŭ membronombro nia dua sekcio, prenis sur sin la aranĝon de nia unua postmilita kongreso. Haarlem aranĝis kursojn en kunlaboro kun la lokaj sekcioj de F.L.E. kaj N.K. El Bergen ni aŭdis nur malmulton. Aranĝo de kurso tie fiaskis. Den Helder, kiu festis sian 25-jaran ekzistadon, kontentige laboris kaj regule kontaktis kun ni. Hilversum sukcesis post kelkaj malfacilaĵoj aranĝi bonan kurson kaj kreskis kontentige. La sekretariino regule raportis. Nova malgranda, sed sufiĉe vigla sekcieto fondiĝis en 't Zand.

*Zuid-Holland*: Kun niaj aktivaj sekcioj en Rotterdam, Den Haag kaj Leiden ni regule interkontaktis. Ĉiuj tri kontentige laboris kaj organizis plurfoje komunajn aranĝojn kun la lokaj sekcioj de F.L.E. kaj N.K. En ĉiuj lokoj oni aranĝis kursojn, kiuj parte ankoraŭ daŭras kaj espereble rezultigos aliĝon de novaj adeptoj.

*Zeeland*: Regule ni korespondis kun nia tiea konsilanto s-ro G. Dijselynck, kiu klopodis restarigi nian iaman sekcion en Terneuzen. La cirkonstancoj malebligis efikan propagandon en tiu provinco.

*Noord-Braband*: S-roj H. A. Appel kaj J. V. Holleman sukcesis restarigi nian sekcion en Bergen-op-Zoom, kiu aranĝis kurson en kunlaboro kun loka grupo de N.K.

*Limburg*: En tiu provinco ni ĝis nun havis nur ĝeneralajn anojn. Kun kelkaj el ili ni skribe kontaktis.

*Biblioteko*: Feliĉe la bibliotekisto, s-ro E. A. Koot, en 1941-a sukcesis ĝustatempe „subakvigi" la bibliotekon. Poste montriĝis, ke tamen kelkaj verkoj perdiĝis. En 1945-a nur malmultaj anoj pruntis librojn el la biblioteko. La raporto aperis en la antaŭa numero.

*Teatra servo*: Sufiĉe multaj sekcioj pruntis en 1945 propagandbroŝurojn kaj (aŭ) materialon por gaja vespero (teatraĵojn, kantojn, enigmojn, k.t.p.). La gvidanto de la servo pretigis novan katalogeton. La raporto aperis en „Nederlanda Esperantisto" 1-a.

*Propaganda servo*: La malfacilaj cirkonstancoj preskaŭ malebligis efikan agadon en 1945. La gvidanto de la servo, s-ro H. Bakker, publikigis raporton pri sia laboro en la antaŭa numero.

*Radio-Servo*: La gvidanto de la radio-servo ne sendis raporton. Verŝajne la malfacilaj cirkonstancoj malebligis la funkciadon de la servo.

*Libro-Servo*: Ankaŭ ĉi tiun servon influis la konataj cirkonstancoj, sed ne malfavore! Kvankam ni devis tute rekonstrui la servon (la stoko perdiĝis en 1941) kaj nur malmultaj verkoj estis haveblaj, la provizora gvidanto de la servo, s-ro A. J. Kalma, ofte devis labori nokte, por kontentigi la dezirojn de la studema kaj legema klientaro. Pri la rezultato ni povas esti tre kontentaj, ĉar kvankam la servo ekfunkciis nur fine de aŭgusto, la profita saldo sumiĝas iom pli ol g. 250,—. Pro la kurzoŝanĝiĝoj kaj la fakto, ke de diversaj antaŭmilitaj eldonaĵoj la stoko estas nur tre malgranda, ni ne kompilis katalogon, sed regule anoncis en niaj cirkuleroj. Okaze de la Zamenhofa tago (tago de la libro) nur la sekcioj en Amsterdam kaj Hilversum aranĝis specialan propagandon. Kie restis la aliaj?

*Organo*: Manko de papero malebligis al ni eldonon de „Nederlanda Esperantisto" en 1945. Ĉar treege sentiĝis la bezono pri ligilo inter la funkciuloj, sekcioj kaj

membroj, ni decidis aperigi ciklostilitajn cirkulerojn. En 1945 aperis entute 7 cirkuleroj, redaktitaj de la ĝen. sekr., kiuj telegramstile menciis la plej urĝajn kaj plej gravajn komunikojn.

*Propraj eldonaĵoj:* De „Ponto al la Praktiko" kaj „Konciza Historio" ĉiuj restintaj ekzempleroj estis konfiskataj en 1941. De „Practisch Leerboek" ni retrovis en 1945 ĉe la presisto 260 ekzemplerojn, kiuj rapide forvendiĝis. Ankaŭ de „Examen Doen" kaj „100 Vragen" (eldonaĵoj de la libro-servoj de F.L.E. kaj L.E.E.N.) la tuta provizo perdiĝis. En kunlaboro kun F.L.E. ni decidis represigi lastnomitan verketon.

*Skriba B-kurso:* En la aŭtuno de 1945 s-ro H. A. Appel daŭrigis la skriban B-kurson, kiun li devis ĉesigi en marto 1941. La interesiĝo pri tiu kurso estas tre kontentiga. ĉar la fakto, ke la jam aperintaj lecionoj ankoraŭ estis haveblaj, rezultigis aliĝon de multaj novaj kursanoj.

*Oficejo „Esperanto ĉe la Instruado":* Ankaŭ ties funkciado estis malfavore influata de la malfacilaj cirkonstancoj. Responde al artikolo de s-ro G. Bolkestein, aperinta en „Het Parool", la gvidanto de la oficejo, s-ro P. W. Baas, verkis artikolon, kiu aperis en diversaj ĵurnaloj kaj revuoj kaj estis sendata al ĉiuj niaj anoj kune kun la 2-a cirkulero. Nur malmultaj sekcioj uzis por sia prapagando la de la oficejo eldonitan broŝuron „Esperanto op de School".

*Ekzamena Komitato:* En 1945 okazis du ekzamenoj, resp. 21-an de okt. en Amsterdam kaj 27-an de okt. en Den Haag. La raporto de la sekretariino-kasistino f-ino H. M. Mulder aperis en „Nederlanda Esperantisto" 1-a. En kunveno, okazinta 22-an de dec. en Amsterdam, la reprezentantoj de F.L.E., L.E.E.N., N.K. kaj N.C.E.V. decidis, ke en 1946-a estos unu ekzamena komitato, en kiu kunlaboros la ĉi-supre nomitaj asocioj.

*Nederlanda Centra Komitato Esperantista:* La 22-an de dec. la reprezentantoj de F.L.E., L.E.E.N., N.K. kaj N.C.E.V. fondis en kunveno okazinta en Amsterdam, la Nederlandan Centran Komitaton Esperantistan, kiu reprezentos la nederlandan esperantistaron antaŭ ŝtataj kaj publikaj instancoj, kaj okupos sin pri ĉiuj taskoj, kiuj estas komunaj al la partoprenantaj unuiĝoj. Krome la komitato subtenos daŭran kontakton inter la kunlaborantaj asocioj.

*Internacia Organizo:* Tuj kiam la internacia poŝta trafiko ebligis tion, ni denove interkontaktis kun la Centra Oficejo de I.E.L. Regule ni en la cirkuleroj instigis niajn anojn al membriĝo. Multaj novuloj anoncis sin kiel individuaj anoj, ne nur en Nederlando sed ankaŭ eksterlande. Fine de la jaro 1945-a la nombro da individuaj membroj en Nederlando sumiĝis 272. Ĉefdelegito estis s-ro A. Pascha (Bergen); la reprezentantoj de L.E.E.N. en la komitato de I.E.L. estis s-roj P. W. Baas kaj W. Grolleman.

*Ĝenerala propagando:* Manko de papero kaj aliaj malficilaĵoj malfavore influis la ĝeneralan propagandon. En septembro ni sendis al la sekcioj kaj propagandistoj cirkuleron enhavantan diversajn propagandajn sugestojn. Ĉar montriĝis neeble presigi broŝurojn kaj flugfoliojn en sufiĉe granda kvanto, ni decidis disponigi afiŝojn al la sekcioj. Multaj sekcioj laŭdis niajn novajn propagandilojn kaj preskaŭ ĉiuj mendis kvanton por sia propaganda laboro. Krome

ni disponigis la broŝuron „Esperanto op de School" kaj cirkuleron pri nia asocio.

*Kursoj.* Kvankam la manko de trafikiloj malebligis la aranĝadon de diversaj planitaj kursoj, tamen multaj el niaj sekcioj sukcesis organizi kursojn, kelkfoje en kunlaboro kun lokaj sekcioj de alia(j) asocio(j). El la certe nekompletaj informoj, kiujn havigis al mi la sekciaj sekretarioj, mi kalkulis, ke en 1945 en nia sekciaro komenciĝis 21 kursoj por komencantoj kun entute 327 gelernantoj en 18 lokoj. La sperto montras, ke ĝenerale la kursoj rezultigis membrokreskon nur por tiuj sekcioj, kiuj tuj komencis la propagandon por aliĝo al la asocio kaj ne atendis ĝis la kursfino. Manko de trafikiloj malfavore influis regulan vizitadon fare de la kursanoj.

Jen, konciza (por ŝpari lokon en nia organo) raporto pri nia asocio. Ĝojiga fakto estas, ke ŝajne la organiza kompreno de niaj sekciaj estraranoj pliboniĝis. Kun multaj sekcioj ni regule interkontaktis kaj iliaj sekretarioj regule informis nin pri la sekcia vivo. Nur kelkaj estraranoj daŭre malatentis niajn komunikojn, informojn, petojn, k.t.p. Ili bone konsciu, ke la ĉefestraro kaj aliaj funkciuloj povas fari neniom, se la sekciaj estraroj kaj la anoj ne kunlaboras. Koran dankon al ĉiuj, kiuj per siaj regulaj raportoj kaj kunlaboro faciligis nian taskon! Espereble ilia imitinda ekzemplo instigos al kunlaboro aliajn, kiuj ĝis nun „ne havis tempon" aŭ „ne estis kapablaj", por ke la plua ekzistado de nia asocio ne pezu sur la ŝultroj de nur malmultaj fervoruloj. La bazo de nia asocio estas firma; la financa stato kontentiga. Kune ni daŭrigu la rekonstruadon! La Estonto Estas Nia! La Sekretario.

## KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO

*Nova sekcio.* La 1-an de marto naskiĝis nova sekcio en Deventer. Ni nun havas 29 sekciojn. Kie kaj kiam anoncos sin la 30-a?

*Prospekto ekzamena komitato.* Al ĉiuj sekcioj ni sendis la prospekton pri la ekzamenoj, kiu laŭpete estas senpage havebla ĉe la ĝen. sekretario de L.E.E.N.

*Abonprezo „Nederlanda Esperantisto".* La abonprezo por neanoj de L.E.E.N. estas por la nuna jaro g. 2,00. Sekcioj, kiuj deziras aboni N.E. por sia arkivo aŭ por la publika legejo, pagas nur g. 0,75.

*Proksima numero.* La 3-a numero de „Nederlanda Esperantisto", kiu enhavos i.a. la tagordon de la jarkunveno de L.E.E.N., aperos proksimume 16-an de aprilo. Presotaĵoj atingu la redaktoron plej malfrue 6-an de aprilo.

*Delegitoj jarkunveno.* La sekciaj sekretarioj bonvolu resendi al ni la oficialigan ateston por la delegit(in)o al la jarkunveno antaŭ 1-a de aprilo.

*Sekciajn kasistojn, atentu!* Ni denove petas la sekciajn kasistojn, pagi la sekcian kotizon por la unua duonjaro kiom eble plej baldaŭ. La ĉefestraro rajtas malpermesi al delegitoj de nepagintaj sekcioj ĉeeston de la jarkunveno.

---

**RAPORTO DE LA KONTROLINTO**

La subskribinto kontrolis la bibliotekon de L.E.E.N. kaj la administradon de la bibliotekisto kaj trovis ĉion en ordo.

H. Nevels.

---

Aanmelding voor het eerstvolgend examen op 11 Mei a.s. in Den Haag uiterlijk 30 Maart a.s.

31 DECEMBRO 1945.

| | SALDBILANCO | | PERDO KAJ GAJNO | | BILANCO | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Kaso | 259.12 | | | | 259.12 | |
| Komunuma Ĝirkonto | 310.54 | | | | 310.54 | |
| Poŝtĝirkonto | 1414.03 | | | | 1414.03 | |
| Cirkuleroj | 136.90 | | 136.90 | | | |
| Elspezoj | 383.29 | | 383.29 | | | |
| Donacoj | | 133.10 | | 133.10 | | |
| S-ro A. J. Kalma | 64.85 | | | | 64.85 | |
| Kotizoj | | 581.15 | | 581.15 | | |
| Kreditoroj | | 37.16 | | | | 37.16 |
| Lernolibro | | 305.00 | | 305.00 | | |
| Libro-Servo | 50.00 | 2.90 | 50.00 | | | 2.90 |
| Afiŝoj | | 25.75 | | 25.75 | | |
| Radio-Servo | 3.00 | | 3.00 | | | |
| Teatra Servo | 7.58 | | 7.58 | | | |
| Asociaj Membroj I.E.L. | 185.00 | | 185.00 | | | |
| Kotizoj I.E.L. | | 23.50 | | 23.50 | | |
| Spezfolioj I.E.L. | | 958.83 | | | | 958.83 |
| S-ro A. Pascha | | 28.50 | | | | 28.50 |
| Kapitalo | | 718.42 | | | | 1021.15 |
| Gajno | | | 302.73 | | | |
| | 2814.31 | 2814.31 | 1068.50 | 1068.50 | 2048.54 | 2048.54 |

## RAPORTO DE LA KONTROLINTOJ

La subskribintoj kontrolis la librotenadon de L.E.E.N. kaj trovis ĉion en bona ordo. Ili proponas malŝarĝi la kasistinon, dankante ŝin pro ŝia plenzorga kaj akurata laboro.

S. H. J. Blok.
H. Wensel.

## AGENDA JAARVERGADERING*

Amendement van de afd. Groningen en Leeuwarden op het voorstel van afd. Utrecht: „Indien men hierin niet slaagt, trachte men in elk geval tot uitgave van één gemeenschappelijk studieblad te komen".

Zoals gewoonlijk zal ook ditmaal weer één der punten van de agenda gewijd zijn aan kritiek op de leiding van het H.B. In dit verband verzoeken wij de afdelingen een opgave van de te bespreken onderwerpen van te voren aan den alg. secr. te doen toekomen.

---

### NOVAJ ELDONOJ:

*Landkarto de Nederlando*, formato 43 x 35 c.M., kun indiko de ĉiuj lokoj, kie loĝas esperantistoj. Desegnita de s-ro H. C. Magel, Voorbeek 6 Aalst-Waalre. Havebla ĉe la desegninto. Prezo g. 0,75.

*Projekto de lernolibro* laŭ metodo, kiu distingiĝas per jenaj aranĝoj: Vortlistoj tute forestas. Aŭtomata enmemorigo de la vortmaterialo per plurfoja legado de la tekstoj, konsistantaj ne el apartaj frazoj sed el simplaj anekdotoj kaj rakontoj. Gramatikaj regulój klarigataj per apuda teksto nederlandlingva. Prezo g. 1,50. Stencilita eldono. Interesiĝantoj turnu sin al la aŭtoro s-ro G. P. de Bruin, Preangerstr. 35, Enschedé.

*Gildo de S-a Ajdan.* De s-ro J. M. Toorneman el Deventer ni ricevis broŝuron pri la gildo de S-a Arjan (vidu rubrikon „Weet U..." en la antaŭa numero) el kiu montriĝas, ke la ĉefa celo de tiu gildo estas: konservadi la belecon de la kamparo, vilaĝoj, arkitekturo, transportiloj, k.t.p. per farado kaj ekspoziciado de miniaturaj modeloj laŭ objektoj, kiujn minacas pereo.

---

### MORTOJ

Nur nun sekcio Bergen ricevis certan informon pri la sorto de sia fervora ano s-ro *R. A. Blad.* Li mortis en 1941 en la milito surmare, estante maŝinisto en oleoŝipo.

### XIII-a NED. ESPERANTO-KONGRESO AMSTERDAM.

La nombro da kongresanoj kreskas kaj eĉ superas niajn atendojn!

Pri la lunĉo aperos informoj en la proksima numero. Rilate la komunan tagmanĝon ni sciigas al vi, ke estas bezonata unu viandkupono (100 gr.). Bonvolu ne forgesi! La kongresanoj, kiuj devos kunporti litotukojn, k.t.p., ricevos pri tio skriban komunikon. Ni planis ŝipekskurson tra Amsterdam kaj la haveno je lundo 22-a de aprilo, sed ankoraŭ ne scias, ĉu ni ricevos permeson por tio. Esperebl̨e ni en la venonta numero povos doni definitivajn informojn. Ĉiujn kongres-dokumentojn oni ricevos en la akceptejo. Ĉar vojaĝado estas ankoraŭ temporaba okupo, la kongreso finiĝos lundon verŝajne je la 1-a anstataŭ kiel kutime, posttagmeze je la 4-a horo.

Dua listo de aliĝintoj (ĝis 12-a de marto):

*Amersfoort:* s-ino J. A. Döbken—Mulder, s-ro L. Staal, s-ino M. Staal—v. Ringen, *Amsterdam:* f-ino J. Kiel, s-ro W. J. Nijveld, s-ino A. Nijveld—v. Duuren, f-ino A. J. Ploeg, s-ro W. P. Roelofs, s-ino N. Scheffer—Bon, s-ro W. Wenting, *Arnhem:* s-ro H. Arends, s-ino M. A. Arends—Doll, s-ro W. Verhoeff, s-ino A. Verhoeff—Kramer, s-ro A. Willemsen, *Badhoevedorp:* s-ro E. Warries, *Bergen:* s-ro H. W. de Koning, *Bergen-op-Zoom:* s-ro H. A. Appel, s-ro J. V. Holleman, *Berlikum:* s-ro F. v. d. Meer, f-ino S. A. K. v. d. Zee, *Bolsward:* f-ino S. Buwalda, *Callantsoog:* s-ro K. Kos, *Culemborg:* s-ro A. J. v. Meenen, *Dokkum:* s-ro J. A. v. d. Veen, s-ino G. L. v. d. Veen—de Vries, *Enschedé:* s-ro D. Baart, f-ino A. D. Tusveld, *Groningen:* f-ino J. le Rütte, f-ino A. Tebbenhof, f-ino A. Tuitjer, *Haarlem:* s-ro E. de Wolf met Wolvin; *Den Haag:* s-ro L. J. Burger, s-ro D. v. Dulst, *Den Helder:* s-ro J. Heres, s-ro C. J. Timmerman, s-ino G. Zwierstra—v. Berkhoven, *Hilversum:* f-ino G. Hüsken, f-ino C. Knies, f-ino L. Oele, f-ino E. Ploeger, s-ino J. Wiersma—de la Fette, *Hoogezand:* s-ro D. Prins, *Leeuwarden:* f-ino A. A. Drent, s-ro H. F. v. Ewijk, f-ino A. Laverman, *Leiden:* f-ino H. Aukes, *Oegstgeest:* s-ro H. Baljet, *Rotterdam:* f-ino J. v. Leeuwen, f-ino M. Seilberger, *Schagerbrug:* s-ro T. Vrielink, *Sneek:* s-ro J. v. d. Meulen, s-ino A. v. d. Meulen—Wempe, s-ro

K. Niemeijer, s-ino Niemeijer—Meijer, *Utrecht:* f-ino J. A. Brouwer, f-ino J. W. Wouterse, *Velp:* s-ro W. A. Schuyt, *Wijnaldum:* s-ro A. Hoekstra, *'t Zand:* s-ro H. B. Vries, *Zwolle:* s-ino H. Soeteman—Rube.
Entute: 134.

## WEET U....

dat is opgericht een veren. van esperantisten, werkzaam in de grafische bedrijven in Nederland (secretariaat: F. B. E. ten Hagen, Nepveusstraat 33², Amsterdam)?

dat Praag op weg is „Verda Stacio" te worden en dat acteurs en koristen van de opera te Praag reeds ijverig Esperanto leren voor de komende uitzendingen?

dat onze oud-landgenote mevr. I. Bartošik-Woudstra op 18 Febr. voor radio Praag heeft gesproken?

dat het bekende blad „Heroldo de Esperanto" weldra weer zal verschijnen?

dat het F.L.E.-congres met Paschen te Alkmaar zal worden gehouden en de jaarvergadering van N.C.E.V. op 19 April te Utrecht?

dat de ook in ons land zeer bekende Esperanto-leraar D. Bartošik aan het hoofd staat van een speciale Esperanto-afdeling van het Tsjechoslowaakse ministerie van voorlichting?

dat op de Handels-Technische school te Forli (Italië) Esperanto als tweede verplichte taal wordt onderwezen?

dat aan de Rijks-Universiteit te Sofia Esperanto als leervak is ingevoerd?

dat de bekende schrijver J. Baghy momenteel secretaris is van een veren. van esperantisten-politiebeambten te Boedapest?

dat men in Hongarije en Frankrijk overweegt Esperanto-uitzendingen in de programma's op te nemen en dat de landelijke Esperanto-verenigingen aldaar derhalve verzoeken adhaesie-betuigingen te zenden resp. aan Magyar Központi Hirado R.T., Budapest VIII Sandor ut. 7 en aan Radio Nationale, Courrier des Auditeurs, 107 Rue de Grenelle, Paris?

dat L.E.E.N. reeds 850 leden heeft?

---

SVEDA RADIO dissendos programon en Esperanto marde la 16 aprilo (16.10—16.30 M.E.T.) ondlongo: 19,80m. En venontaj monatoj la Esperantodissendoj okazos je la samaj horoj la 16 majo, la 14 junio kaj la 16 julio. Bonvolu sendi informon pri la aŭskulteblecoj kaj eventualaj programproponoj al Sveda Esperanto-Instituto, Tegelbacken, Stockholm, al kiu estas komisiite de la Sveda radio aranĝi la Esperanto-programojn.

---

## SOLVOJ DE LA ENIGMOJ

1. Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon!
   vanelo, duŝo, azeno, mano, nevo, freneza.
2. Fero, aleo, bufo, inko, opio, lago, alno. „Fabiola".
3. Ardeo, dogo, foko, zebro, kapro, apro (!), ĉevalo, ezoko, alko, uro, abelo, gado, cimo.

Gajnis premiojn: s-ro L. Staal, f-ino T. J. Stienstra kaj f-ino W. M. Millenaar.

---

## CORRESPONDENTIE-ADRESSEN

Leden van de Esp. veren. te Silkeborg, p/a s-ino Mary Greve, Drechselvej la Silkeborg, Denemarken; Zweedse gymnasiasten te Östersund, p/a Esp. Klubo H. A. Läroverhet, Östersund, Zweden; cursisten van s-ro J. Gendrier, Cormeray (Loir-et-Cher) Frankrijk; Esp. veren. „La Torĉo" rua Morais Soares 77-6 Lisboa, Portugal organiseert „letervesperon" op 14 Apr. a.s.

[library stamp]